HAN RINER
(Han Ryner)

# INDIVIDUISTA MANLIBRETO

el la franca originalo
tradukis Valo.

Suplemento
de

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
105B 1975 1,50 FF

**han riner**

(Han Ryner)

# Individuista manlibreto

el la franca originalo
tradukis Valo.

Suplemento
de

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
105B ❀ 1975 ❀ 1,50 FF

En la sama broŝurserio :

- La Kvina Evangelio (Han Riner, trad. Valo)

  kaj pli ol kvardek aliaj tekstoj.

  Venontaj broŝuroj :

- Liberecanaj vivkonceptoj pri soci-organizado (Fontaura) + En anarkista socio (J. Grave) (reeldono)
- Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg)
- La Triviala Homo (Ingenieros)
- La anarkista agado en la revolucio - Revolucia registaro (Kropotkin)

La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut, Francio.

# Notoj

Mi adoptis la formon per demandoj kaj respondoj, tiel oportunan por rapida prezentado. Ĉi tie ĝi esprimas nenian dogman pretendon. Ne estas tie ĉi demandanta majstro kaj respondanta disĉiplo. Estas individuisto sin mem demandanta. Mi volis en la unua linio indiki, ke temas pri interna dialogo. Dum la katehismo demandas : "Ĉu vi estas kristano?", mi diras : "Ĉu mi estas individuisto ?". Sed, plu daŭrante, la procedo ne estus sen malavantaĝoj, kaj, post kiam mia intenco estis signita, mi memoris, ke la solparolo ofte uzas la pronomon de la dua persono.

En tiu ĉi libreto oni trovos mikse veraĵojn, kiuj estas certaj - sed kies certecon, cetere, oni povas eltrovi nur en si mem - kaj opiniojn, kiuj estas probablaj. Ekzistas problemoj, kiuj allasas plurajn respondojn. Aliaj - ekster la heroa solvo, kiun konsili oni povas nur kiam ĉio cetera estas krimo - ne havas solvon tute kontentigan, kaj la proksimumoj, kiujn mi proponas, ne estas superaj al aliaj proksimumoj. Mi ne insistas. La leganto, kiu ne scipovus distingi, kaj, jesante al la veraĵoj, trovi probablaĵojn analogajn al miaj probablaĵoj kaj ofte pli harmoniajn al li mem, estus neinda je la nomo individuisto.

Pro manko je sufiĉa disvolvado aŭ pro aliaj kaŭzoj, mi ofte lasos nesatigita eĉ plej fratecan spiriton. Al bonvolulój mi povas nur rekomendi diligentan legadon de la <u>Manlibro de Epikteto</u>. Tie, plibone ol ĉie alie, troviĝas la respondo al niaj maltrankviloj kaj duboj. Tie, pli ol ĉie alie, kiu kapablas je vera kuraĝo, tiu kuraĝon ĉerpos.

De Epikteto, ankaŭ de aliaj, mi prunteprenis formulojn, ne ĉiam opiniante necese indiki miajn ŝuldojn. En tasko kia ĉi tiu, gravas la aferoj, ne ilia deveno, kaj oni manĝas pli ol unu frukton sen demandi la ĝardeniston pri la nomo de la rivero aŭ rivereto, kiu fekundigas lian ĝardenon.

## Ĉapitro Ia
## Pri individuismo kaj kelkaj individuistoj.

- Ĉu mi estas individuisto ?
- Mi estas individuisto.
- Kion mi komprenas per la nomo individuismo ?
- Per individuismo mi nomas la moralan doktrinon, kiu, sin apogante sur neniu dogmo, sur neniu tradicio, sur neniu ekstera volo, alvokas nur al la individua konscienco.
- Ĉu la nomo individuismo ĉiam signadis nur tiun doktrinon ?
- Ofte oni donis la nomon individuismo al ŝajnaj doktrinoj destinitaj por kovri per filozofia masko la malkuraĝan egoismon aŭ la konkereman kaj agreseman egoismon.
- Citu malkuraĝan egoiston, kiun oni iafoje nomis individuisto.
- Montaigne.
- Ĉu vi konas konkeremajn kaj agresemajn egoistojn, kiuj sin proklamis individuistoj ?
- Ĉiuj, kiuj etendas al la interhomaj rilatoj la brutan leĝon de l'batalo por vivo.
- Citu nomojn.
- Stendhal, Nietzsche. °)
- Nomu kelkajn verajn individuistojn.
- Sokrato, Epikuro, Jesuo, Epikteto.
- Kial vi amas Sokraton ?
- Li ne instruis veron eksteran al la aŭskultantoj, sed li instruis ilin trovi la veron en si mem.
- Kiel mortis Sokrato ?
- Li mortis kondamnite per la leĝo kaj per la juĝistoj, murdite de la Civito, martiro de individuismo.
- Pri kio li estis akuzita ?
- Ke li ne honoris la diojn honoratajn de la Civito, kaj ke li koruptis la junularon.
- Kion signifis ĉi lasta akuzo ?
- Ĝi signifis, ke Sokrato elmontradis opiniojn malagrablajn al la potencularo.
- Kial vi amas Epikuron ?

---

°)La Individuista Manlibreto ne nomas vivantojn.

- Sub sia malzorgema eleganteco, li estis heroo.
- Citu inĝenian vorton de Seneko pri Epikuro.
- Seneko nomis Epikuron "virine alivestita heroo".
- Kiun bonon faris Epikuro ?
- Li liberigis siajn disĉiplojn je la timo al dioj aŭ al Dio, kiu estas la komenco de malsaĝo.
- Kiu estis la granda virto de Epikuro ?
- Abstinemo. Li distingadis inter la naturaj kaj la imagaj bezonoj. Li montris, ke necesas ja malmulto por satigi malsaton kaj soifon, por sin defendi kontraŭ varmo kaj malvarmo. Kaj li sin liberigis je ĉiuj aliaj bezonoj, t.e. je preskaŭ ĉiuj deziroj kaj preskaŭ ĉiuj timoj, kiuj sklavigas la homojn.
- Kiel mortis Epikuro ?
- Li mortis pro longa kaj doloriga malsano, fanfaronante pri perfekta feliĉo.
- Ĉu ĝenerale oni konas la veran Epikuron ?
- Ne. Malfidelaj disĉiploj kovris siajn malvirtojn per lia doktrino, kiel oni kaŝas ulceron sub ŝtelita mantelo.
- Ĉu Epikuro estas kulpa pri tio, kion dirigis al li liaj falsaj disĉiploj ?
- Neniam oni estas kulpa pri alies malsaĝo aŭ perfido.
- Ĉu la misformigo de la Epikura doktrino estas escepta fenomeno ?
- Ĉiu parolo de vero, se ĝi estas aŭskultita de multaj homoj, estas transformita en mensogon far la supraĵuloj, la lertuloj kaj la ĉarlatanoj.
- Kial vi amas Jesuon ?
- Li vivis libera kaj vaganta, fremda al ĉia socia ligo. Li estis malamiko de la pastroj, de la eksteraj kultoj, kaj ĝenerale de ĉiaj organizoj.
- Kiel li mortis ?
- Persekutita de la pastroj, forlasita de la juĝa aŭtoritato, li mortis najlita de soldatoj sur kruco. Li estas, kun Sokrato, la plej fama viktimo de la Religio, la plej fama martiro de individuismo.
- Ĉu ĝenerale oni konas la veran Jesuon ?
- Ne. La pastroj krucumis lian doktrinon kiel lian korpon. Ili transformis en venenon la vivigan trinkaĵon. Sur la falsigitaj paroloj de la malamiko de

organizoj kaj kultoj, ili fondis la plej organizitan kaj la plej pompe malplenan el la religioj.
- Ĉu Jesuo estis kulpa pri tio, kion la disĉiploj kaj la pastroj faris el lia doktrino ?
- Neniam oni estas kulpa pri alies malsaĝo aŭ perfido.
- Kial vi amas Epikteton ?
- La stoikisto Epikteto kuraĝe elportis malriĉecon kaj sklavecon. Li estis perfekte feliĉa en situacioj plej penigaj por ordinaraj homoj.
- Kiel ni konas la doktrinon de Epikteto ?
- Lia disĉiplo Arriano kolektis kelkajn el liaj vortoj en libreto titolita Manlibro de Epikteto.
- Kion vi opinias pri la Manlibro de Epikteto ?
- Ĝia preciza kaj senmanka nobleco igas ĝin por mi multe pli altvalora ol la Evangelioj. La Manlibro de Epikteto estas la plej bela kaj la plej liberiga el ĉiuj libroj.
- Ĉu ne estas en la historio aliaj famaj individuistoj ?
- Estas aliaj. Sed tiuj, kiujn mi nomis, estas la plej puraj kaj plej facile kompreneblaj.
- Kial vi ne nomas la cinikistojn Antistenon kaj Diogenon ?
- Tial, ke la cinika doktrino estas skizo de la stoika doktrino.
- Kial vi ne nomas Zenonon de Cittio, la fondinton de stoikismo ?
- Lia vivo estis admirinda, kaj, laŭ antikvaj atestoj, li senĉese similadis al sia filozofio. Sed nuntempe li estas malpli fama ol tiuj, kiujn mi nomis.
- Kial vi ne nomas la stoikiston Mark-Aŭrelion ?
- Tial ke li estis imperiestro.
- Kial vi ne nomas Kartezion (Descartes) ?
- Kartezio estis intelekta individuisto. Li ne estis sufiĉe nete morala individuisto. Lia vera moralo ŝajnas esti stoika. Sed li ne kuraĝis publikigi ĝin. Li konigis nur "provizoran moralon", en kiu li rekomendas al si obei la leĝojn kaj kutimojn de sia lando, kio estas la malo de individuismo. Cetere li ŝajnas esti mankinta je filozofia kuraĝo en aliaj cirkonstancoj.

- Kial vi ne nomas Spinozon ?
- La vivo de Spinozo estis admirinda. Li sobre vivadis per kelkaj grieroj kaj iom da laktosupo. Rifuzante la majstrokatedrojn al li oferitajn, li ĉiam perlaboradis sian nutraĵon per manlaboro. Lia morala doktrino estas stoika mistikismo. Sed, tro ekskluzive intelekta, li instruas strangan absolutisman politikon, kaj rezervas kontraŭ la potenco nur la pensliberon. Cetere lia nomo pensigas pri granda metafizika kapablo, ankoraŭ pli ol pri granda morala belo.

## Ĉapitro IIa
## Preparado por praktika individuismo.

- Ĉu sufiĉas sin proklami individuisto ?
- Ne. Religio povas kontentiĝi per parola aliĝo kaj kelkaj adoraj gestoj. Praktika filozofio ne praktikata estas nenio.
- Kial la religioj povas montri pli da indulgo ol la moralaj doktrinoj ?
- La dioj de la religioj estas potencaj monarkoj. Ili savas la kredantojn per gracoj kaj mirakloj. Ili konsentas la savon interŝanĝe de la leĝo, de iuj ritaj paroloj kaj de iuj konvenciaj gestoj. Ili eĉ povas kunkalkuli la gestojn, kiujn mi farigas, kaj la parolojn, kiujn mi dirigas per dungatoj.
- Kion mi devas fari por efektive meriti la nomon individuisto ?
- Mi devas akordigi miajn agojn kun mia penso.
- Ĉu tiu akordo ne estas penige atingebla ?
- Ĝi estas malpli peniga, ol ĝi ŝajnas.
- Kial ?
- La komencanta individuisto estas retenata de la falsaj havaĵoj kaj de la malbonaj kutimoj. Li ne liberiĝas sen ia ŝiriĝo. Sed la malakordo inter liaj agoj kaj lia penso estas al li pli peniga ol ĉiuj rezignoj. Li suferas pro ĝi, kiel muzikisto suferas pro manko je harmonio. Por nenia prezo muzikisto konsentus pasigi sian vivon meze de misakordaj bruoj. Same mia misharmonio estas al mi la plej

granda el la doloroj.

- Kiel nomiĝas la strebado por akordigi sian vivon kun sia penso ?

- Ĝi nomiĝas la virto.

- Ĉu la virto ricevas rekompencon ?

- La virto estas mem sia rekompenco.

- Kion signifas tiuj vortoj ?

- Ili signifas du aferojn :

1-e. Se mi pensas pri rekompenco, mi ne estas virta. La virto havas kiel unuan karakteron la neprofitemon.

2-e. La neprofitema virto kreas feliĉon.

- Kio estas feliĉo ?

- Feliĉo estas stato de animo, kiu sin sentas perfekte akorda kun si mem.

- Ĉu do estas feliĉo nur tiam, kiam oni jam ne bezonas peni, kaj ĉu la feliĉo postvenas la virton ?

- La saĝulo ĉiam bezonas penon kaj virton. Li daŭre estas de ekstere atakata. Sed la feliĉo ja ekzistas nur en animo, en kiu ne estas plu interna batalado.

- Ĉu oni estas malfeliĉa en la strebado al saĝeco ?

- Ne. En atendo de feliĉo, ĉiu venko produktas ĝojon.

- Kio estas ĝojo ?

- Ĝojo estas la sento pri paso de malpli granda perfekteco al perfekteco pli granda. Ĝojo estas la sento, ke oni antaŭeniras al feliĉo.

- Distingu per komparo inter ĝojo kaj feliĉo.

- Pacema estulo, trudita batali, ricevas venkon, kiu proksimigas lin al paco : li sentas ĝojon. Fine li atingas pacon, kiun nenio povos malserenigi : li estas en feliĉo.

- Ĉu endas provi akiri feliĉon kaj perfektecon jam la unuan tagon, kiam oni komprenas ?

- Malofte oni povas sen malsingardo provi la tujan perfektecon.

- Kiun danĝeron riskas la malpacienculoj ?

- La danĝeron retroiri kaj senkuraĝiĝi.

- Kiel konvenas sin prepari por perfekteco ?

- Konvenas iri al Epikteto pasante tra Epikuro.

- Kion vi intencas diri ?

- Endas unue sin loki ĉe la vidpunkto de Epikuro kaj distingi la naturajn bezonojn disde la imagaj bezonoj. Kiam ni estos kapablaj praktike malŝati ĉion, kio ne estas necesa al la vivo; kiam ni ne alte taksos lukson kaj komforton; kiam ni frandos la fizikan volupton, kiu eliĝas el simplaj nutraĵoj kaj trinkaĵoj; kiam nia korpo, tiel bone kiel nia animo scios la bonecon de pano kaj akvo : tiam ni povos plu antaŭeniri.

- Kiu paŝo restos farenda ?

- Restos al ni senti, ke eĉ senigite je pano kaj akvo, ni estus feliĉaj; ke eĉ en malsano plej doloriga kaj plej senhelpa, ni estus feliĉaj; ke eĉ mortante en torturado kaj meze de ĉies insultoj, ni estus feliĉaj.

- Ĉu tiu supro de saĝo estas de ĉiu atingebla ?

- Tiu supro estas atingebla de ĉiu bonvola homo, kiu sentas en si naturan inklinon al individuismo.

- Kiu estas la intelekta vojo kondukanta al tiu supro ?

- Ĝi estas la stoikista doktrino pri la veraj bonoj kaj la veraj malbonoj.

- Kiel ankaŭ estas nomata tiu doktrino ?

- Oni ankaŭ nomas ĝin la doktrino pri la aferoj de ni dependaj kaj la aferoj de ni ne dependaj.

- Kiuj estas la aferoj de ni dependaj ?

- Niaj opinioj, niaj deziroj, niaj inklinoj, niaj malinklinoj, unuvorte ĉiuj niaj internaj agoj.

- Kiuj estas la aferoj de ni ne dependaj ?

- La korpo, la riĉaĵoj, la reputacio, la altoficoj, unuvorte ĉiuj aferoj, kiuj ne estas el niaj internaj agoj.

- Kiuj estas la karakteroj de la aferoj de ni dependaj ?

- Ili estas denature liberaj; nenio povas ilin haltigi aŭ kontraŭstari.

- Kiuj estas la karakteroj de la aferoj de ni ne dependaj ?

- Ili estas malfortaj, sklavaj, elmetitaj al multaj baroj kaj maloportunaĵoj, kaj tute fremdaj al la homo.

- Kiu estas alia nomo de la aferoj de ni ne dependaj ?
- La aferoj de ni ne dependaj nomiĝas ankaŭ la indiferentaj aferoj.
- Kial ?
- Ĉar neniu el ili estas vera bono aŭ vera malbono.
- Kio okazas al tiu, kiu prenas indiferentajn aferojn por bonoj aŭ malbonoj ?
- Li ĉie renkontas barojn; li estas afliktita, konfuzita; li plendadas kontraŭ la aferoj kaj la homoj.
- Ĉu li ne spertas ankoraŭ pli grandan malbonon ?
- Li estas sklavo de deziro kaj timo.
- Kiu estas la stato de tiu, kiu scias praktike, ke la aferoj de ni ne dependaj estas indiferentaj ?
- Li estas libera. Neniu povas trudi lin fari, kion li ne volas, aŭ ne fari, kion li volas. Li havas por plendi kontraŭ nenio kaj neniu.
- Ĉu ekzemple malsano, karcero, malriĉeco ne malpliigas lian liberon?
- La eksteraj aferoj povas ja malpliigi la liberon de mia korpo kaj de miaj movoj. Ili ne estas malhelpoj por mia volo, se mi ne estas tiel malsaĝa, ke mi volu tion, kio ne dependas de mi.
- Ĉu la doktrino de Epikuro ne sufiĉas en la ordinaro de nia vivo ?
- La doktrino de Epikuro sufiĉas, se mi havas la aferojn necesajn al la vivo, kaj se mi bonfartas. Ĝi faras min, en ĝojo, egala al la bestoj, kiuj ne forĝas al si maltrankvilojn kaj malbonojn. Sed, en malsano aŭ malsato, ĝi ne plu sufiĉas.
- Ĉu ĝi sufiĉas en la sociaj rilatoj ?
- En la ordinaraj sociaj rilatoj ĝi povas sufiĉi. Ĝi liberigas min je ĉiuj tiranoj, kiuj havas potencon nur sur mia superfluo.
- Ĉu ekzistas sociaj cirkonstancoj, en kiuj ĝi ne plu sufiĉas ?
- Ĝi ne sufiĉas plu, se la tirano povas senigi min je pano; se li povas mortigi min aŭ vundi mian korpon.

- Kiun vi nomas tirano ?

- Mi nomas tirano iun ajn, kiu, agante sur indiferentajn aferojn, kiaj la riĉaĵoj aŭ mia korpo, pretendas agi sur mian volon. Mi nomas tirano iun ajn, kiu provas modifi mian animstaton per aliaj rimedoj ol racia persvado.

- Ĉu ne ekzistas individuistoj, al kiuj sufiĉos epikurismo ?

- Kia ajn estas mia nuno, mi nescias, ĉu la granda atako, en kiu ne plu sufiĉas epikurismo, ne gvatas al mi en iu vojturno de mia vivo. Do, tuj kiam mi atingis la epikuran saĝon, mi devas strebi por perfektigi min ĝis la stoika nevundebleco.

- En kvieto, kiel mi vivos ?

- En kvieto mi povos vivi milde kaj sobre kiel Epikuro, sed en la spirito de Epikteto.

- Ĉu estas utile por mia perfektiĝo, ke mi proponu al mi modelon tian, kia Sokrato, Jesuo aŭ Epikteto ?

- Tiu metodo estas malbona.

- Kial ?

- Ĉar mi devas realigi mian harmonion, ne tiun de aliulo.

- Kiom da specoj de devoj ekzistas ?

- Ekzistas du specoj de devoj : universalaj kaj personaj.

- Kiujn devojn vi nomas universalaj ?

- Mi nomas universalaj devoj tiujn, kiuj trudiĝas al ĉiu saĝa homo.

- Kiujn devojn vi nomas personaj ?

- Mi nomas personaj tiujn devojn, kiuj trudiĝas aparte al mi.

- Ĉu ekzistas personaj devoj ?

- Ekzistas personaj devoj. Mi estas aparta estulo troviĝanta en apartaj situacioj. Mi posedas iun gradon de fizika forto, de intelekta forto, kaj mi posedas pli-malpli multe da riĉaĵoj. Mi havas daŭrigendan estintecon. Mi devas lukti kontraŭ malamika destino aŭ kunlabori kun amika destino.

- Distingu per facila signo la personajn devojn disde la universalaj devoj.

- Krom esceptoj la universalaj devoj estas devoj

de sindeteno. Preskaŭ ĉiuj devoj de ago estas personaj devoj. Eĉ en la maloftaj cirkonstancoj, en kiuj ago sin trudas al ĉiuj, la detalo de la ago ricevos la markon de la aganto, ĝi estos kvazaŭ subskribo de la morala artisto.

- Ĉu persona devo povas kontraŭdiri universalan devon ?

- Ne. Ĝi estas kiel floro, kiu povas kreski nur sur planto.

- Ĉu miaj personaj devoj estas tiuj de Sokrato, de Jesuo aŭ de Epikteto ?

- Ili neniel similas al ili, se mi ne vivas apostolan vivon.

- Kiu instruos al mi miajn personajn devojn kaj miajn universalajn devojn ?

- Mia konscienco.

- Kiel ĝi instruos al mi miajn universalajn devojn ?

- Dirante al mi, kion mi atendus de ĉiu saĝa homo.

- Kiel ĝi instruos al mi miajn personajn devojn ?

- Dirante al mi, kion mi devas postuli de mi.

- Ĉu ekzistas malfacilaj devoj ?

- Ne ekzistas devoj malfacilaj por la saĝulo.

- Antaŭ ol mi atingos la saĝon, ĉu la penso de Sokrato, de Jesuo, de Epikteto ne estos al mi utila en malfacilaj okazoj ?

- Ĝi povas esti al mi utila. Sed neniam mi prezentos al mi tiujn grandajn individuistojn kiel modelojn.

- Kiel mi prezentos ilin al mi ?

- Mi prezentos ilin al mi kiel atestantojn. Kaj mi deziros, ke ili ne mallaŭdu mian agadmanieron.

- Ĉu ekzistas gravaj kulpoj kaj malgravaj ?

- Grava estas ĉiu kulpo, kiu estas konata kiel tia, antaŭ ol ĝi estas farita.

- Teorie, por juĝi pri mia situacio aŭ pri tiu de aliulo en la vojo al saĝo, ĉu mi ne povas distingi gravajn kaj malgravajn kulpojn ?

- Mi povas.

- Kion mi nomos malgrava kulpo ?

- Mi ordinare nomos malgrava kulpo tiun, kiun Epikteto mallaŭdus kaj Epikuro ne mallaŭdus.

- Kion mi nomos grava kulpo ?
- Mi nomos grava kulpo tiun, kiun mallaùdus eĉ la indulgo de Epikuro.

## Ĉapitro IIIa
## Pri rilatoj inter individuoj.

- Diru la formulon de la devoj kontraù aliuloj.
- Amu vian proksimulon kiel vin mem kaj vian Dion super ĉio.
- Kiu estas mia proksimulo ?
- La aliaj homoj.
- Kial vi nomas la aliajn homojn via proksimulo ?
- Tial ke, naturdotitaj je racio kaj volo, ili estas al mi pli proksimaj ol la bestoj.
- Kion komunan kun mi havas la bestoj ?
- La vivon, la sentemon, la inteligenton.
- Ĉu tiuj komunaj karakteroj kreas al mi devojn kontraù la bestoj ?
- Tiuj komunaj karakteroj kreas al mi la devon ne suferigi la bestojn, eviti al ili neutilajn suferojn kaj ne mortigu ilin sennecese.
- Kiun rajton donas al mi la neesto de racio kaj volo en la bestoj ?
- Ĉar la bestoj ne estas personoj, mi rajtas servigi ilin al mi laùmezure de ilia forto, kaj transformi ilin en instrumentojn.
- Ĉu mi havas la saman rajton kontraù iuj homoj.
- Neniam mi rajtas rigardi personon kiel rimedon. Ĉiu persono estas celo. Mi povas nur peti de personoj servojn, kiujn ili konsentas al mi libere, pro bonvolo aù interŝanĝe por aliaj servoj.
- Ĉu ne ekzistas malsuperaj rasoj ?
- Malsuperaj rasoj ne ekzistas. Nobla individuo povas en ĉiuj rasoj flori.
- Ĉu ne ekzistas malsuperaj individuoj ne kapablaj pri racio kaj volo ?
- Escepte de frenezulo, ĉiu homo estas kapabla je racio kaj volo. Sed multaj aùskultas nur siajn pasiojn kaj havas nur kapricojn. Inter ili oni renkontas tiujn, kiuj pretendas komandi.
- Ĉu ni ne rajtas fari al ni instrumentojn el tiuj

nekompletaj individuoj ?

- Ne. Mi devas rigardi ilin kiel infanojn haltigitajn en sia elvolviĝo, sed en kiuj eble morgaŭ la homo vekiĝos.

- Kion mi opinios pri la ordonoj de tiuj, kiuj pretendas komandi ?

- Ordono povas esti nur kaprico de infano aŭ fantazio de frenezulo.

- Kiel mi devas ami mian proksimulon ?

- Kiel min mem.

- Kion signifas tiuj vortoj ?

- Ili signifas : en la sama maniero, en kiu mi devas ami min.

- Kiu instruos al mi, kiel mi devas ami min ?

- La dua parto de la formulo instruas al mi, kiel mi devas ami min.

- Ripetu tiun duan parton.

- Amu vian Dion super ĉio.

- Kio estas Dio ?

- La vorto Dio havas plurajn sencojn : ĝi havas sencon diferencan en ĉiu religio aŭ metafiziko kaj ĝi havas unu moralan sencon.

- Kiu estas la morala senco de la vorto Dio ?

- Dio estas la nomo de la morala perfekteco.

- Kion signifas, en la formulo de amo, la posesiva "via", "amu vian Dion" ?

- Mia Dio estas mia morala perfekteco.

- Kion mi devas ami super ĉio ?

- Mian racion, mian liberon, mian internan harmonion, mian feliĉon : ĉar tiuj estas la aliaj nomoj de mia Dio.

- Ĉu mia Dio postulas oferojn ?

- Mia Dio postulas, ke mi oferu al ĝi miajn dezirojn kaj miajn timojn; ĝi postulas, ke mi malŝatu la falsajn havaĵojn, kaj ke mi estu "spirite malriĉa".

- Kion plie ĝi postulas ?

- Ĝi plie postulas, ke mi estu preta oferi al ĝi mian sentemon, kaj, se bezone, mian vivon.

- Kion do mi amos en mia proksimulo ?

- Mi amos la Dion de mia proksimulo, t.e. lia racia, lia interna harmonio, lia feliĉo.

- Ĉu mi ne havas devojn kontraŭ la sentemo de mia proksimulo ?

- Mi havas kontraŭ la sentemo de mia proksimulo la samajn devojn, kiel kontraŭ la sentemo de la bestoj aŭ de mi mem.

- Klarigu tion.

- Nek en iun alian nek en min mi kreos neutilan suferon.

- Ĉu mi rajtas krei utilan suferon ?

- Mi ne rajtas aktive krei utilan suferon. Sed iuj necesaj sindetenoj sekvigos suferon en aliulo aŭ en mi. Ne pli al alies sentemo ol al mia sentemo mi devas oferi mian Dion.

- Kiuj estas la devoj kontraŭ alies vivo ?

- Mi devas nek mortigi nek vundi mian proksimulon.

- Ĉu ne ekzistas okazoj, en kiuj oni rajtas mortigi?

- En la okazo de laŭleĝa sindefendo, ŝajnas, ke la defendo kreas la rajton mortigi. Sed preskaŭ ĉiam, se mi estas sufiĉe brava, mi konservos la flegmon, kiu ebligas sin savi sen mortigi.

- Ĉu ne pli valoras elporti la atakon sendefende ?

- Sindeteno estas ja, ĉi tie, la signo de supera virto, la vera heroa solvo.

- Ĉu ne ekzistas, fronte al alies sufero, malpravaj sindetenoj ekzakte egalvaloraj kiel malbonaj agoj ?

- Ja ekzistas tiaj. Se mi lasas morti iun, kiun mi povas senkrime savi, mi estas vera murdanto.

- Citu pri tio vorton de Bossuet.

- "Tiu malhumana riĉulo senvestigis la malriĉulon, ĉar li ne vestis lin; li kruele lin buĉis, ĉar li ne nutris lin."

- Kion vi opinias pri sincereco ?

- Sincereco estas mia unua devo kontraŭ aliaj, kaj ĝi estas kontraŭ mi mem la atesto, kiun mia Dio postulas kiel daŭran oferon, kiel flamon, kiun mi devas neniam lasi estingiĝi.

- Kiu estas la plej necesa sincero ?

- La proklamado de miaj moralaj certaĵoj.

- Kiun sinceron vi lokas en dua rango ?

- La sinceron en la esprimo de miaj sentoj.

- Ĉu negrava estas la ekzakteco en la eksponado de eksteraj faktoj ?

- Ĝi estas multe malpli grava ol la du grandaj sincerecoj, filozofia kaj sentimenta. Tamen la saĝulo ĝin observadas.

- Kiom da mensogoj ekzistas ?

- Ekzistas tri specoj de mensogoj, nome : la malica mensogo, la bonintenca mensogo, servema mensogo kaj la ĝoja mensogo.

- Kio estas malica mensogo ?

- Malica mensogo estas tiu, kiu celas malutili al aliulo.

- Kion vi opinias pri la malica mensogo ?

- La malica mensogo estas krimo kaj malkuraĝaĵo.

- Kio estas bonintenca mensogo ?

- Bonintenca mensogo estas tiu, kies celo estas mia aŭ alies utilo.

- Kion vi opinias pri la bonintenca mensogo ?

- Kiam la bonintenca mensogo enhavas neniun malutilan elementon, la saĝulo ne mallaŭdas ĝin ĉe aliaj, sed li mem evitas ĝin.

- Ĉu ne estas okazoj, en kiuj bonintenca mensogo trudiĝas, se ekzemple mensogo povas savi ies vivon ?

- En tia okazo, la saĝulo povos diri mensogon koncernantan nur faktojn. Sed preskaŭ ĉiam, anstataŭ mensogi, li prefere rifuzos respondi.

- Ĉu ĝoja mensogo estas permesita ?

- La saĝulo malpermesas al si ĝojan mensogon.

- Kial ?

- Ĝoja mensogo oferas al ludo la aŭtoritaton de la parolo, kiu, konservite, povas utili al aliulo.

- Ĉu la saĝulo malpermesas al si fikcion ?

- La saĝulo malpermesas al si neniun konfesitan fikcion, kaj okaze diras parabolojn, fablojn, simbolojn aŭ mitojn.

- Kiaj devas esti la rilatoj inter viro kaj virino?

- La rilatoj inter viro kaj virino devas esti, kiel ĉiuj rilatoj inter personoj, absolute liberaj de ambaŭ flankoj.

- Ĉu estas alia regulo observenda en tiuj rilatoj ?

- Ili devas esprimi reciprokan sincerecon.

- Kion vi opinias pri amo ?

- Reciproka amo estas la plej bela inter la indiferentaj aferoj, la plej proksima je virto. Ĝi faras la

noblecon de l'pariĝo.

– Ĉu la pariĝo sen amo estas peko ?

– Se la pariĝo sen amo estas la interrenkonto de du deziroj kaj de du plezuroj, ĝi ne estas peko.

## Ĉapitro IVa
## Pri socio.

– Ĉu mi havas rilatojn nur kun izolitaj individuoj ?

– Mi havas rilatojn ne nur kun izolitaj individuoj, sed ankaŭ kun diversaj sociaj grupoj, kaj ĝenerale, kun la socio.

– Kio estas socio ?

– Socio estas la kuniĝo de individuoj por komuna afero.

– Ĉu komuna afero povas esti bona ?

– Komuna afero povas esti bona laŭ iuj kondiĉoj.

– Laŭ kiuj kondiĉoj ?

– La komuna afero estas bona, se, pro reciproka amo aŭ pro amo al la afero, la laborantoj agas ĉiuj libere, kaj se iliaj penoj grupiĝas kaj sin intersubtenas en harmonia kunordiĝado.

– Ĉu fakte la socia afero havas tiun liberecan karakteron ?

– Fakte la socia afero havas neniun liberecan karakteron. La laborantoj estas subordigitaj unuj al aliaj. Iliaj penojestas ne la spontaneaj harmoniaj gestoj de amo, sed la grincantaj gestoj de truditeco.

– Kion vi konkludas el tiu karaktero de la socia afero ?

– Mi konkludas, ke la socia afero estas malbona.

– Kiel la saĝulo rigardas la socion ?

– La saĝulo rigardas la socion kiel limon. Li sentas sin socia, kiel li sentas sin mortema.

– Kia estas la sinteno de saĝulo fronte al limoj ?

– Saĝulo rigardas limojn kiel materiajn necesaĵojn, kaj li fizike elportas ilin kun indiferento.

– Kiuj estas la limoj por tiu, kiu estas marŝanta al saĝo ?

– Por tiu, kiu estas marŝanta al saĝo, la limoj konsistigas danĝerojn.

- Kial ?

- Kiu ankoraŭ ne distingas praktike, kun neŝancelebla certeco, la aferojn de li dependajn kaj la indiferentajn aferojn, tiu riskas traduki materiajn trudojn en moralajn devigojn.

- Kion devas fari neperfekta individuisto fronte al la socia trudado ?

- Li devas defendi kontraŭ ĝin sian racion kaj sian volon. Li repuŝos la antaŭjuĝojn, kiujn ĝi trudas al aliaj homoj, li sin defendos ĝin ami aŭ malami; li grade liberiĝos el ĉia timo kaj el ĉia deziro rilate al ĝi; kaj li sin direktos al la perfekta indiferenteco, kiu estas la saĝo fronte al la aferoj de li ne dependaj.

- Ĉu la saĝulo esperas pli bonan socion ?

- La saĝulo malpermesas al si ĉian esperon.

- Ĉu la saĝulo kredas pri progreso ?

- Li rimarkas, ke saĝuloj estas en ĉiu epoko malmultaj, kaj ke ne ekzistas morala progreso.

- Ĉu la saĝulo ĝojas pro la materiaj progresoj ?

- La saĝulo rimarkas, ke la materiaj progresoj celas pligrandigi la artefaritajn bezonojn de unuj kaj la laboron de aliaj. La materia progreso aspektas al li kiel kreskanta pezo, kiu pli kaj pli enprofundigas la homaron en koton kaj penon.

- Ĉu la inventado de perfektigitaj maŝinoj ne malpliigos la homan laboron ?

- La inventado de maŝinoj ĉiam pligravigadis la laboron. Ĝi faris ĝin pli peniga kaj malpli harmonia. Ĝi anstataŭigas la liberan kaj inteligentan iniciaton per servuteca kaj timema precizo. Ĝi faris el la laboristo, iam ridetanta mastro de la iloj, tremantan sklavon de la maŝino.

- Kiel la maŝino, kiu multobligas la produktojn, ne malpliigas la kvanton da laboro liverenda de la homoj?

- La homo estas avida, kaj la frenezo de la imagaj bezonoj kreskas proporcie al ĝia satiĝo. Ju pli multe da superfluaĵoj havas la malsaĝulo, des pli multe li deziras havi.

- Ĉu la saĝulo praktikas socian agadon ?

- La saĝulo rimarkas, ke por praktiki socian agadon, necesas agi sur la amasojn, kaj ke sur la amasojn oni

agas ne per racio, sed per pasioj. Li ne opinias, ke li rajtas levi la pasiojn de la homoj. La socia agado aspektas al li kiel tiraneco, kaj li sin detenas partopreni en ĝi.

- Ĉu la saĝulo ne estas egoista, forgesante la feliĉon de la popolo ?

- La saĝulo scias, ke tiuj vortoj : "feliĉo de la popolo" havas nenian sencon. Feliĉo estas interna kaj individua; nur en si mem oni povas ĝin produkti.

- Ĉu do la saĝulo ne kompatas la subprematojn ?

- La saĝulo scias, ke plendanta subpremato aspiras fariĝi premanto. Li lin faciligas laŭ la mezuro de siaj povoj, sed li ne kredas pri la savo per komuna agado.

- Ĉu do la saĝulo ne kredas pri reformoj ?

- Li rimarkas, ke reformoj ŝanĝas la nomojn de aferoj, ne la aferojn mem. La sklavo fariĝis la servutulo, poste la salajrulo. Oni neniam reformis ion krom la lingvo. La saĝulo restas indiferenta al tiuj filologiaj demandoj.

- Ĉu la saĝulo estas revoluciema ?

- Sperto pruvas al la saĝulo, ke neniam revolucioj havas daŭrajn rezultojn. Racio diras al li, ke mensogo ne refutiĝas per mensogo, kaj ke perforto ne detruiĝas per perforto.

- Kion la saĝulo opinias pri anarkio ?

- La saĝulo rigardas anarkion kiel naivaĵon.

- Kial ?

- La anarkisto kredas, ke la registaro estas la limo de la libero. Li esperas, detruante la registaron, plilarĝigi la liberon.

- Ĉu li ne estas prava ?

- Ne. La vera limo estas ne la registaro, sed la socio. La registaro estas socia produkto kiel alia. Arbon oni ne detruas detranĉante unu el ĝiaj branĉoj.

- Kial la saĝulo ne strebas detrui la socion ?

- Socio estas neevitebla, kiel morto. Sur la materia nivelo, nia povo estas malforta kontraŭ tiaj limoj. Sed la saĝulo detruas en si la respekton kaj la timon kontraŭ la socio, samkiel li detruas en si la timon kontraŭ la morto. Li estas indiferenta al la

politika kaj socia formo de la medio, en kiu li vivas, kiel li estas indiferenta al la morto lin atendanta.

- Ĉu do la saĝulo neniam agos kontraŭ la socion ?

- La saĝulo scias, ke oni detruas nek la socian maljuston nek la akvon de la maro. Sed li penas savi subprematon el aparta maljusto, samkiel li sin ĵetas en akvon por savi dronanton.

## Ĉapitro Va
## Pri la sociaj rilatoj.

- Ĉu laboro estas socia leĝo, aŭ ĉu natura leĝo ?

- Laboro estas natura leĝo pligravigita de la socio.

- Kiel la socio pligravigas la naturan leĝon pri laboro ?

- Laŭ tri manieroj :

1-e. Ĝi arbitre sendevigas kelkajn homojn je ĉia laboro kaj transĵetas ilian parton de la ŝarĝo sur la ceterajn homojn;

2-e. Ĝi servigas multe da homoj al neutilaj laboroj, al sociaj funkcioj;

3-e. Ĝi multobligas ĉe ĉiuj, kaj aparte ĉe la riĉuloj, imagajn bezonojn, kaj ĝi trudas al malriĉuloj la abomenindan laboron necesan por la satigado de tiuj bezonoj.

- Kial vi trovas natura la leĝon pri laboro ?

- Tial ke nia korpo havas naturajn bezonojn, kiujn satigos nur la produktoj de laboro.

- Ĉu do vi konsideras kiel laboron nur manlaboron?

- Ja, sendube.

- Ĉu ne ankaŭ la spirito havas naturajn bezonojn ?

- La sola natura bezono de niaj intelektaj povoj estas ekzercado. La spirito ĉiam restas feliĉa infano bezonanta movon kaj ludon.

- Ĉu ne necesas apartaj laboristoj por doni al la spirito okazojn por ludi ?

- La spektaklo de la naturo, la observado de homaj pasioj kaj la plezuro de konversacioj sufiĉus al la naturaj bezonoj de la spirito.

- Ĉu do vi kondamnas arton, sciencon kaj filozofion ?

- Mi ne kondamnas tiujn plezurojn. Simile al amo, ili restas noblaj, kiel longe ili restas neprofitemaj. En arto, en scienco, en filozofio, en amo, la volupto, kiun mi sentas min donante, ne devas esti pagata de tiu, kiu gustumas la volupton ricevi.

- Sed ekzistas artistoj pene kreantaj kaj scienculoj laciĝe serĉantaj.

- Se la peno superas la plezuron, mi ne vidas, kial tiuj kompatinduloj ne sin detenas.

- Do vi postulas de la artisto kaj de la sciencisto manlaboron ?

- De la sciencisto kaj de la artisto, kiel de la amanto kaj de la amantino, la naturo postulas manlaboron; ĉar ĝi trudas al ili, kiel al ceteraj homoj, naturajn bezonojn.

- Ankaŭ la kriplulo havas naturajn bezonojn, kaj vi ne estus tiel kruela trudi al li taskon, por kiu li estas nekapabla ?

- Sendube, sed mi ne konsideras kiel kriplaĵojn la belecon de la korpo aŭ la fortecon de la penso.

- Do la individuisto laboros per siaj manoj ?

- Jes, tiom, kiom eble.

- Kial vi diras : tiom, kiom eble ?

- Tial, ke la socio igis malfacila la obeon al natura leĝo. Ne por ĉiuj ekzistas gajniga laboro. Ordinare oni vekiĝas al individuismo tro malfrue por lerni manlaboron. La socio ŝtelis de ĉiuj, por ĝin doni al kelkaj, la grandan instrumenton de natura laboro, la teron.

- Do la individuisto povas, en la nuna stato de la aferoj, sin vivteni per tasko, kiun li ne rigardas kiel veran laboron ?

- Li povas.

- Ĉu la individuisto povas esti funkciisto ?

- Jes. Sed li ne povas konsenti pri ĉiaj funkcioj.

- De kiaj funkcioj sin detenos la individuisto ?

- La individuisto sin detenos de ĉia funkcio el la klaso administracia, el la klaso juĝa aŭ el la klaso militista. Li ne estos prefekto aŭ policisto, oficiro, juĝisto aŭ ekzekutisto.

- Kial ?

- La individuisto ne povas esti el la aro de la sociaj tiranoj.
- Kiujn funkciojn li povas akcepti ?
- La funkciojn, kiuj ne malutilas al aliaj homoj.
- Ekster la funkcioj salajrataj de la registaro, ĉu ekzistas karieroj malutilaj, de kiuj sin detenos la individuisto ?
- Ja ekzistas.
- Citu kelkajn el ili.
- Ŝtelado, banko, ekspluatado al prostituitino, ekspluatado al laboristo.
- Kiaj estos la rilatoj de la individuisto kontraŭ liaj sociaj subuloj ?
- Li respektos ilian personecon kaj ilian liberon. Li neniam forgesos, ke profesia devo estas fikcio, kaj homa devo estas la sola morala realaĵo. Li neniam forgesos, ke la hierarkioj estas malsaĝaĵoj, kaj li agados nature, ne socie, kontraŭ la homoj, kiujn la socia mensogo asertas liaj subuloj, sed el kiuj la naturo faras liajn egalulojn.
- Ĉu la individuisto havos multe da eksteraj rilatoj kun siaj sociaj subuloj ?
- Li evitos la sindetenojn, kiuj povus ilin ofendeti. Sed li malmulte rilatos kun ili, pro timo ilin trovi sociaj, ne naturaj; mi intencas diri : pro timo ilin trovi sklavemaĉaj, ĝenataj aŭ malamikaj.
- Kiaj estos la rilatoj de la individuisto kun liaj kolegoj aŭ kunfratoj ?
- Li estos ĝentila kontraŭ ili. Sed, tiom kiom li povos sen ofendi ilin, li evitos ilian konversacion.
- Kial ?
- Por sin defendi kontraŭ du subtilajn venenojn : la korporaciamon kaj la profesian brutiĝadon.
- Kiel kondutos la individuisto kontraŭ siaj sociaj superuloj ?
- La individuisto ne forgesos, ke la paroloj de liaj sociaj superuloj preskaŭ ĉiam pritraktas indiferentajn temojn. Li indiferente aŭskultos kaj kiel eble malplej respondos. Li ne kontraŭdiros. Li ne indikos metodojn, kiuj ŝajnus al li pli bonaj. Li evitos ĉian neutilan diskutadon.
- Kial ?

- Tial, ke socia superulo ordinare estas vanta kaj incitiĝema infano.

- Se la socia superulo ordonos jam ne indiferentan agon, sed maljustaĵon aŭ kruelaĵon, kion faros la individuisto ?

- Li rifuzos obei.

- Ĉu malobeo ne elmetos lin al danĝeroj ?

- Ne. Fariĝi instrumento de maljusto kaj malbono, tio estas la morto de racio kaj libero. Sed malobeo al maljusta ordono endanĝerigas nur la korpon kaj la materiajn rimedojn, kiuj apartenas al la aro de indiferentaj aferoj.

- Kiu estos la penso de la individuisto kontraŭ maljusta ordono ?

- La individuisto enmense diros al la maljusta estro : "Vi estas unu el la modernaj enkarniĝoj de tirano. Sed tirano povas nenion kontraŭ saĝulo."

- Ĉu la individuisto eksplikos sian rifuzon de obeo ?

- Jes, se li kredas la socian estron kapabla kompreni kaj retroi de sia eraro.

- Preskaŭ ĉiam la socia estro estas nekapabla kompreni. Tiam, kion faros la individuisto ?

- Kontraŭ maljusta ordono, oberifuzo estas la sola universala devo. La formo de la rifuzo dependas de mia personeco.

- Kiel la individuisto rigardas la amason ?

- La individuo rigardas la amason kiel unu el la plej brutaj el la naturaj fortoj.

- Kiel li agas meze de amaso, kiu faras nenian malbonon ?

- Li penas ne senti sin en konformeco kun la amaso, kaj ne lasi dronigi, eĉ dum momento, sian personecon.

- Kial ?

- Por resti libera homo. Ĉar eble baldaŭ neantaŭvidita ekbato elŝprucigos la kruelecon de la amaso, kaj kiu komencis senti kiel ĝi, kiu vere estos parto de la amaso, tiu malfacile elliberiĝos en la momento de la moralo impeto.

- Kion faros la saĝulo, se la amaso, en kiu li troviĝas, provos maljustaĵon aŭ kruelaĵon ?

- La saĝulo kontraŭstaros per ĉiuj noblaj aŭ indiferentaj rimedoj al la maljustaĵo aŭ kruelaĵo.
- Kiujn rimedojn ne uzos la saĝulo eĉ en tiaj cirkonstancoj ?
- La saĝulo ne malaltiĝos ĝis mensogo, petado aŭ flataĉado.
- Flati la amason estas potenca oratora rimedo. Ĉu la saĝulo absolute ĝin malpermesos al si ?
- La saĝulo povos direkti al la amaso, kiel al infano, tiajn laŭdojn, kiuj estas ironie afabla envolvaĵo de konsiloj. Sed li scios, ke la limo estas necerta kaj la aventuro danĝera. Li riskos sin en ĝi, nur se li estas certa ne nur pri la firmeco de sia animo, sed ankaŭ pri la preciza supleco de sia parolo.
- Ĉu la saĝulo asignos antaŭ tribunalo ?
- Neniam la saĝulo asignos antaŭ tribunalo.
- Kial ?
- Asigni antaŭ tribunalo, tio estas, pro materiaj kaj indiferentaj interesoj, oferi al la socia idolo kaj agnoski la tiranecon. Plie, estas malkuraĝe voki ĉies potencon por helpo al si.
- Kion faros la saĝulo, se li estos akuzita ?
- Li povos, laŭ sia karaktero, aŭ diri la veron, aŭ kontraŭmeti al la socia tiraneco malŝaton kaj silenton.
- Se la individuisto sin rekonos kulpa, kion li diros ?
- Li diros sian realan kaj naturan kulpon, ĝin nete distingos disde la ŝajna kaj socia kulpo, pro kiu li estas persekutata. Li plie diros, ke lia konscienco trudas al li, pro lia vera kulpo, la veran punon. Sed la socio, kiu agas nur sur indiferentajn aferojn, trudos al li, pro lia ŝajna kulpo, ŝajnan punon.
- Se la saĝulo akuzita estas senkulpa antaŭ sia konscienco kaj kulpa laŭ la leĝoj, kion li diros ?
- Li eksplikos, kiel lia leĝa kulpo estas natura senkulpeco. Li diros sian malŝaton al la leĝo, tiu organizita maljusto kaj tiu senpotenco, kiu ne povas ion al ni, sed nur al nia korpo kaj al niaj riĉaĵoj, indiferentaj aferoj.
- Se la saĝulo akuzita estas senkulpa antaŭ sia

konscienco kaj antaŭ la leĝoj, kion li diros ?

- Li povos diri nur sian realan senkulpecon. Se tamen li konsentos ekspliki siajn du senkulpecojn, li deklaros, ke nur la unua gravas por li.

- Ĉu la saĝulo atestos antaŭ civilaj tribunaloj?

- La saĝulo ne rifuzos sian ateston al subpremata malfortulo.

- Ĉu la saĝulo atestos antaŭ puna tribunalo aŭ krima kortumo ?

- Jes, se li konas iun veron favoran al la akuzito.

- Se la saĝulo konas veron malutilan al la akuzito, kion li faros ?

- Li silentos.

- Kial ?

- Ĉar ĉiam kondamno estas maljustaĵo, kaj la saĝulo ne faros sin komplico de maljustaĵo.

- Kial vi diras, ke ĉiam kondamno estas maljustaĵo ?

- Tial ke neniu homo rajtas trudi morton al alia homo aŭ lin enŝlosi en karceron.

- Ĉu la socio ne havas aliajn rajtojn ol la individuoj ?

- La socio, aro da individuoj, ne povas havi rajton, kiu troviĝas en neniu individuo. Nuloj adiciitaj, kiel ajn multaj oni ilin supozas, ĉiam egalas nulon en sumo.

- Ĉu la socio ne estas en laŭleĝa sindefendo kontraŭ iuj krimuloj ?

- La rajto pri laŭleĝa sindefendo ne daŭras pli longe ol la atako mem.

- Ĉu la saĝulo sidos kiel juĝanto ?

- Vokite por partopreni juĝantaron, la saĝulo povos rifuzi aŭ konsenti.

- Kion faros la saĝulo, se li konsentis esti juĝanto ?

- Li ĉiam respondos <u>Ne</u> al la unua demando : Ĉu la akuzato estas kulpa ?

- Ĉu tiu respondo ne estos kelkafoje mensogo ?

- Tiu respondo neniam estos mensogo.

- Kial ?

- La demando de la prezidanto estas jene traduken-

da : "Ĉu vi volas, ke ni trudu punon al la akuzato?" Kaj mi estas devigata respondi "Ne", ĉar al neniu mi rajtas trudi punon.

- Kion vi opinias pri duelo ?

- Ĉiu voko al perforto estas malbono. Sed duelo estas malpli granda malbono ol asigno antaŭ juĝistaro.

- Kial ?

- Ĝi ne estas malkuraĝaĵo, ĝi ne vokas por helpo kaj ne uzas kontraŭ unuopulo ĉies forton.

Ĉapitro VIa
Pri la oferoj al idoloj.

- Ĉu mi povas oferi al idoloj de mia tempo aŭ de mia lando ?

- Mi povas indiferente lasi la idolojn preni de mi indiferentajn aferojn. Sed mi devas defendi tion, kio dependas de mi, kaj kio apartenas al mia Dio.

- Kiel mi distingos mian Dion disde la idoloj ?

- Mia Dio estas proklamata de mia konscienco, ekde kiam ĉi tiu estas vere mia voĉo kaj ne plu eĥo. Sed la idoloj estas kreaĵoj de la socio.

- Laŭ kiu alia karaktero oni rekonas la idolojn ?

- Mia Dio postulas nur la oferon de indiferentaj aferoj. La idoloj postulas la oferon de mi mem.

- Ekspliku tion.

- La idoloj proklamas kiel virtojn la plej sklavemaĉajn malnoblaĵojn, nome disciplinon kaj pasivan obeadon. Ili postulas la oferon de mia racio kaj de mia volo.

- Ĉu la idoloj kulpas aliajn maljustaĵojn ?

- Ne nur ili volas detrui tion, kio estas supera al ili, kaj kion mi neniam rajtas forlasi, sed plie ili volas, ke mi oferu al ili tion, kio neniel apartenas al mi, nome la vivon de mia proksimulo.

- Ĉu vi konas aliajn karakterojn de la idoloj ?

- La vera Dio estas eterna kaj senlima. Ĉiam kaj ĉie mi devas obei al mia racio. Sed la idoloj varias laŭ la tempoj kaj la landoj.

- Montru, kiel la idoloj varias laŭ la tempoj.

- En pasinta tempo oni postulis, ke mi neniigu mian racion kaj mortigu mian proksimulon por la gloro de mi-ne-scias-kiu Dio fremda kaj ekstera al mi, aŭ por la gloro de la Reĝo. Nun oni postulas de mi la samajn abomenindajn oferojn por la honoro de la Patrio. Morgaŭ eble oni postulos ilin por la honoro de la Raso, de la Koloro aŭ de la Mondparto.

- Ĉu idolo varias nur tiam, kiam ŝanĝiĝas ĝia nomo ?

- Idolo kiel eble plej evitas ŝanĝi sian nomon. Sed ĝi ofte varias.

- Citu ŝanĝojn de idolo ne akompanatajn de nomŝanĝo.

- En najbara lando, la idolo Patrio estis Prusio;°) nun, sub la sama nomo, la idolo estas Germanio. Ĝi postulis de la Pruso, ke li mortigu la Bavaron. Poste ĝi postulis de la Pruso kaj de la Bavaro, ke ili mortigu la Francon. En 1859 la Savojano kaj la Nicano riskis baldaŭ kliniĝi antaŭ patrio desegnita en formo de boto; la hazardo de diplomatio igis ilin adori sesangulan patrion. La Polo hezitas inter mortinta idolo kaj vivanta idolo; la Alzacano inter du vivantaj idoloj, kiuj pretendas la saman nomon Patrio.

- Kiuj estas la ĉefaj nunaj idoloj ?

- En iuj landoj la Reĝo aŭ la Imperiestro; en aliaj, oni-ne-scias-kiu fraŭdo nomita Volo de l'Popolo. Ĉie la Ordo, la Politika Partio, la Religio, la Patrio, la Raso, la Haŭtkoloro. Ne forgesu la publikan opinion kun ĝiaj mil nomoj, de la plej bombasta, Honoro, ĝis la plej triviale malalta, "Kion-oni-diros?" (alies opinio).

- Ĉu la Haŭtkoloro estas danĝera idolo ?

- Precipe la blanka Koloro. Okazis, ke ĝi unuiĝis en unu sama kulto Francojn, Germanojn, Rusojn kaj Italojn, kaj havigis de tiuj noblaj pastroj la sangan oferon de granda nombro da Ĉinoj.

- Ĉu vi konas aliajn krimojn de la blanka Haŭtkoloro ?

- Estas ĝi, kiu faras el tuta Afriko inferon. Estas

-------

°) Verkita en 1903 (N.d.l.tr.)

ĝi, kiu detruis la Amerikajn Indianojn kaj linĉigas negrojn.

- Ĉu nur sangon oferas al sia idolo la adorantoj de la Blanka Koloro ?

- Ankaŭ laŭdojn ili oferas al ĝi.

- Diru tiujn laŭdojn.

- Tio estus tro longa litanio. Sed, kiam la Blanka Koloro postulas krimon, la liturgio nomas tiun krimon necesaĵo de Civilizacio kaj Progreso.

- Ĉu la Raso estas danĝera idolo ?

- Jes, precipe kiam ĝi alianciĝas kun Religio.

- Diru kelkajn krimojn de tiuj ambaŭ aliancitoj.

- La Medaj militoj, la konkeradoj de la Saracenoj, la krucmilitoj, la masakro de la Armenoj, la antisemitismo.

- Kiu estas nun la idolo plej postulanta kaj plej universale respektata ?

- La Patrio.

- Diru la apartajn postulojn de la Patrio.

- Soldatservo kaj milito.

- Ĉu individuisto povas esti soldato en paca tempo ?

- Jes, tiel longe, kiam oni ne ordonos al li mortigi.

- Kion faras la saĝulo en milita tempo ?

- La saĝulo neniam forgesas la ordonon de la vera Dio, de la Racio : "Ne mortigu". Kaj li preferas obei al Dio ol al la homoj.

- Kiujn agojn diktos al li lia konscienco ?

- La universala konscienco malofte ordonas precizajn agojn. Preskaŭ ĉiam ĝi diktas malpermesojn. Ĝi malpermesas mortigi aŭ vundi sian proksimulon, kaj pri tiu punkto ĝi diras nenion plian. La metodoj estas indiferentaj, kaj konsistigas personajn devojn.

- Ĉu saĝulo povas resti soldato en milita tempo ?

- Saĝulo povas resti soldato en milita tempo, se li estas tute certa, ke li ne lasos sin konduki al mortigo aŭ vundado.

- Ĉu formala kaj laŭtega rifuzo obei al sangaj ordonoj povas fariĝi strikta devo ?

- Jes, se la saĝulo, pro sia estinteco aŭ pro aliaj motivoj, troviĝas en unu el tiuj situacioj,

kiuj altiras la rigardojn. Jes, se lia sinteno riskas skandali aŭ edifi, povas kuntreni aliajn homojn al bono aŭ al malbono.

- Ĉu la saĝulo pafos al oficiro, kiu donis sangan ordonon ?

- La saĝulo neniun mortigas. Li scias, ke tiranmurdo estas krimo kiel ĉiu vola murdo.

## Ĉapitro VIIa
## Pri la rilatoj inter moralo kaj metafiziko.

- Laŭ kiom da manieroj oni konceptas la rilatojn inter moralo kaj metafiziko .

- Laŭ tri manieroj :

1-e. La moralo estas konsekvenco de la metafiziko, metafiziko en agado.

2-e. La metafiziko estas necesaĵo kaj postulato de la moralo.

3-e. Moralo kaj metafiziko estas sendependaj unu de la alia.

- Kion vi opinias pri la doktrino, kiu dependigas la moralon de la metafiziko ?

- Tiu doktrino estas danĝera. Ĝi apogas la necesan sur la superflua, la certan sur la necerta, la praktikon sur la revo. Ĝi transformas la moralan vivon en somnambulismon tute tremantan pro timo kaj espero.

- Kion vi opinias pri la doktrino, kiu fondas la metafizikon sur la moralo ?

- Unuavide ĝi ŝajnas doni ĉion al la moralo. En realo, se ĝi sin prezentas kiel ion alian ol metodo de revo, se ĝi pretendas konduki al certeco, ĝi estas mensogo kaj intelekta malmoralo, ĉar ĝi asertas kiel realaĵojn tion, kio povas esti nur deziroj kaj esperoj.

- Kion vi opinias pri la koncepto, kiu faras la moralon kaj la metafizikon sendependaj unu de la alia ?

- Ĝi estas la sola tenebla de morala vidpunkto. Ĉe ĝi oni devas en praktiko sin tenadi.

- Ĉu teorie la du unuaj konceptoj ne enhavas parton de vero ?

- Morale falsaj, ili esprimas probablan metafizikan opinion. Ili signifas, ke ĉiuj realaĵoj sin intertenas, kaj ke ekzistas streĉaj rilatoj inter la homo kaj la universo.

- Ĉu la individuismo havas metafizikon ?

- La individuismo ŝajne povas kunekzisti kun plej diversaj metafizikoj. Ŝajne Sokrato kaj la cinikistoj iel malŝatis metafizikon. La epikuranoj estas materialistoj. La stoikistoj estas panteistoj.

- Kion vi opinias pri la metafizikaj doktrinoj ĝenerale ?

- Mi rigardas ilin kiel poemojn kaj mi amas ilin pro ilia beleco.

- El kio konsistas la beleco de metafizikaj poemoj?

- Metafiziko estas bela je du kondiĉoj :

1-e. Ĝi devas esti rigardata kiel ebla kaj hipoteza ekspliko, ne kiel sistemo de certaĵoj, kaj ĝi ne devas nei la najbarajn poemojn;

2-e. Ĝi devas ĉion ekspliki per harmonia reduktado al unueco. °)

- Kion ni faru fronte al asertantaj metafizikoj ?

- Ni devas grandanime senigi ilin je la malbelaĵoj kaj pezaĵoj de asertado, por konsideri ilin kiel poemojn kaj sistemojn de revoj.

- Kion vi opinias pri la dualismaj metafizikoj ?

- Ili estas provizoraj eksplikoj, duon-metafizikoj. Ne ekzistas metafiziko vera; sed la solaj veraj metafizikoj estas tiuj, kiuj fintrafas al monismo. °°)

- Ĉu la individuismo estas la absoluta moralo ?

- Individuismo ne estas moralo. Ĝi estas nur la plej forta morala metodo, kiun ni konas, la plej nevenkebla citadelo de virto kaj feliĉo.

- Ĉu la individuismo konvenas al ĉiuj homoj ?

- Ekzistas homoj, kiujn nevenkeble mallogas la ŝajna akreco de individuismo. Tiuj elektu alian moralan metodon.

- Kiel mi scios, ĉu la individuismo ne konvenas al mia naturo ?

- Se, post lojala provo de individuismo, mi sentas min malfeliĉa; se mi ne sentas, ke mi estas en la vera rifuĝejo; se mi estas konfuzita de kompatoj al mi mem kaj al la aliaj, mi devas fuĝi for de la

individuismo.

- Kial ?

- Ĉar tiu metodo, tro forta por mia malforteco, min kondukus al egoismo aŭ al senkuraĝiĝo.

- Per kiu metodo mi kreos al mi moralan vivon, se mi estas tro malforta por la individuisma metodo ?

- Per altruismo, per amo, per kompatemo.

- Ĉu tiu metodo kondukos min al gestoj diferencaj de la gestoj de individuisto ?

- La estuloj vere moralaj faras ĉiuj la samajn gestojn, kaj precipe sin detenas ĉiuj de la samaj gestoj. Ĉiu morala estulo respektas la vivon de aliaj homoj; neniu morala estulo zorgas gajni neutilajn riĉaĵojn, ktp.

- Kion diros al si altruisto, kiu vane provis la individuistan metodon ?

- Li diros al si : "Mi devas iri la saman vojon. Mi nur demetis la armaĵon, tro pezan por mi, kiu altiris al mi tro fortegajn batojn de la sorto kaj de la homoj. Kaj mi prenis la bastonon de la pilgrimanto. Sed mi ĉiam memorados, ke mi tenas tiun bastonon por subteni min, ne por frapi aliajn per ĝi."

Fino.

---

°) kaj °°) Poste Han Riner evoluis al pli simpatia konsidero, ne al dualismaj, sed ja al pluralismaj metafizikoj. Tion oni povas konstati el liaj verkoj "La Turo de l'Popoloj", "Perditaj Songoj", "Krepuskoj" kaj "La Superegaj Sintezoj". N.d.l.trad.

Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque